

Verda Voĉo

INFORMA INSTRUA KAJ AMUZA BULTENO DE SOMERA ESPERANTO-KOLEGIO

„Verda Voĉo“

Ĉu vi rememoras la kvarpaĝan gazeton hektografitan, kiu fieris esti unusola „ĉiutaga“ gazeto esperantista en la mondo? Kaj ĝi pravis! VV aperadis dum la somera dekkvartaga kursaro en Doksy (1947-52) efektive ĉiutage kun subtitolo „informa, instrua kaj amuza bulteno“. La modesta gazeto plenumadis la tiel fiksitajn programojn tre konsciencie! Interesaj artikoloj pri esperantologio kaj esperantismo, originalaj poemoj kaj aktualaj ilustraĵoj, ĉiutaga kroniko pri okazintaj kulturaj kaj amuzaj entreprenoj, sensaciaj informoj de la „klačema“ esperantisto, humurplenaj anoncoj kaj tiurilataj respondoj - jen la riĉa enhavo de la regule aperintaj numeroj de VV. Ne mire, ke la kursanoj konsideris la VV sian sincera amiko „kies aperon ili ĉiam senpacience atendis, kaj ke VV ankaŭ fariĝis dezirata legaĵo de tiuj, kiuj ne povis ĉeesti en Doksy. Sen VV, kiu per sia interesa enhavo kompletigadis la lingvan instruadon oni ne povus al si prezenti la fame konatan esperantistan somerrestadejon en Doksy kaj ties "Somera kolegio de Esperanto".

Kiam 4 entuziasmoj la 21.VII. 1946 malfermis en Doksy la unuan someran esperanto-kursaron, ili trovis eĉ mokridon kaj envion ĉe la oficialuloj, kiuj opiniis, ke la esperantista movado povus dumsomere, kiel ĝis tiam regule okazadis, profunde dormi. Sed la iniciatintoj ne ektimis la malhelpojn personajn kaj teknikajn, apogataj en la penado per la tiurilataj intereso kaj sopiro de la esperantista popolo, kiu en 3 someroj plenigis la kursaron, pli poste nomitan „Somera esperanta lernejo“ kaj ek de la j. 1949 „SOMERA KOLEGIO DE ESPERANTO“ per 1380 dankemaj gelernantoj. La kolegio per sia celkonscia instrumetodo, unikaj Ĉe-kurso kaj seminario, riĉeco de siaj kulturaj kaj amuzaj entreprenoj kaj vere amika societa medio tiel famiĝis, ke ĝi devis malfermi filiojn eĉ en Slovakio (Svit 1950, Poprad 1952). La senĉese kreskanta nombro de la partoprenintoj kaj speciala kvalifiko de la kolegiaj instruistoj (jam 11 en la j. 1952) montris la popularecon de la „Somera kolegio de Esperanto en Doksy“ kaj ĝian signifon por la kresko kaj kvalito de la esperantista movado en ĈSR. Ĉar la ripetata restado en Doksy ĉe la Mácha-lago povus por certa (turisma) nombro de la kursantoj fariĝi iom enuiga, oni provis je ekstera propono aranĝi venonte la kolegiajn kursojn alterne ankaŭ aliloke kaj la okazigo de la kursoj en la j. 1953 en KOST montriĝis kontentiga! Ni esperu, ke la „Somera kolegio de Esperanto“ sukcesis daŭrigi sian meritplenan poresperantan laboron ankaŭ en la j. 1954. Do, ĝis la amika revido!

Pi

MELANKOLIE...

Ĉu io?-Nenio! Mi scias,
ke vane mi, vane, elkrias.

Neniu ĉi tie aŭdas,
la ondoj de l' tempo mallaŭtas;

kaj ie en ombro sub ŝranko
nur muso kuretas sur planko.

(Flora Ludanto)

„Verda Voĉo“ la amiko de gelernantoj en Somera Esperanto-kolegio en Doksy, Svit, Poprad, aŭdigas sian voĉon:

Pasintjare en Kost pro gravaj malfacilaĵoj mi ne aperadis, sed ĝoju jam - mi klopodos denove vin gajigi en nunjara Somera Esperanto-kolegio kie ajn ĝi okazos. Ŝparu, karaj, por ke ni povu renkontiĝi. Mi povas malkaŝi, ke anoncis sin jam ses partoprenantoj. Mi havas bonajn kunlaborantojn.

Nia devizo estu:

Kion neniu povas, esperantistoj povas!

Eĥo de sub la kastelo "Kost".

Bela aŭtuna dimanĉo! Ĉar la vetero ŝajnis favora, senhezite mi decidis entrepreni ekskurson en mezon de alloga naturo. Post la naŭa horo nia automobilo haltiĝis, ĉu vi scias kie? Rekte sub la kastelo „Kost” en la Ĉeĥa paradizo.

Jes! Ĉu povus esti pli inda loko ol tiu, kie denove la kolegiaro konvinkiĝis, ke nia kara lingvo enhavas daŭran potencon ligi homajn korojn al firma amikeco? Same, kiel dum la pasintaj jaroj en Doksy, ankaŭ sub la majesta historia kastelo „Kost” la geesperantistoj trovis ne sole ripozon, sed ankaŭ instruon kaj, kion mi plej alte taksas, scion, ke nia lingvo vivas, ke ĝi vivos ĉar homoj portas en siaj koroj neforigeblan volon kompreni unu ia alian!

Novaj adeptoj de nia lingvo konvinkiĝis pri altaj kvalitoj kaj seriozaj klopodoj de nia porpaca laboro kaj ili sentis sin inter ni feliĉaj. Ankaŭ la baroj inter esperantistoj kaj indiferentaj homoj kaj vilaĝanoj tie falis. Ili vidis, ke esperantistoj scias sin amuzi dece kaj konvene, kaj ĉefe la sincera amikeco, reganta en nia kolektivo, plaĉis al ili.

Unufraze ni povas esti kontentaj pri farita laboro, ĉar „Kost” estas preta kiam ajn gastigi esperantistojn! Malrapidpaŝe ni promenis tra la valo de sankta Prokopio. Multaj miaj rememoroj fuĝis ĝis al vi, vivantaj en lokoj malproksimaj. Ĉu ne tintis en viaj oreloj? Floroj sur herbejo jam forvelkis, tial mi ne povis kolekti bukedon por vi, sed la naturo, kedu, ne estis malpli bela ol tiam somere. Mankis nur viaj voĉoj sub la muĝantaj arbaroj!

Mi revenis kontenta kun scio, ke esperantistoj trovis sub la kastelo „Kost” novan hejmon.

Ŝo

Somera Esperanto-kolegio en Kost 1953.

Su-Se

Esperanta verda rondo,
a ty v čele milý Tondo,
loĝis sub kastelo Kost-
bylo nás tam tenkrát dost.
Ĉiuj gaje vivis kune,
i počasí bylo slunné,
iam eĉ ni banis nin,
skákali jsme do hlubin,
En la ĉarma suna brilo,
to se nám to vejletilo,
každý dělal, co se dalo,
tra la ĉeĥa paradiz'
každý běhal jako rys!
Por la bela sankta celo,
Esperanto aby znělo,
sub la flag' kun verda stel'
akuzativ každý dřel.

En la ĉarma ĉeĥa valo,
každý dělal co se dalo,
kaj klopodis instruist'
že neměl čas ani jíst.
Ĉar vi zorgis mem pri ĉio,
ty, náš drahý Antonio,

pro la nova verda id'
neměl ani v noci klid.
La lernantoj fartu bone -
proto nosil párky vonné,
post matena instruad',
každý míval hrozný hlad.
Oratoran kurson fari -
k tomu třeba hodně páry,
gvidi ĝin en granda stil'.
To ses, Tondo, zapotil!

Kiam venis la vespero,
a na zámek padlo šero,
ŝvitis vi pro la klopod',
spáchat program lidem vhod:
iam dancis ni en balo,
někdy se též čarovalo,
kaj ĉe tio kun gracil'
zpívali jsme ze všech sil.
Sed ĉe ĉiu nia movo
měls ty, Tondo, hlavní slovo -
kvankam lacis ĉiu ost',
věrné držels celou Kost.
Ĉio iam devas pasi -
vzpomeň na ty krásné časy.
En somera verda klas'
sejdeme se za rok zas!

Personaj aferoj.

Dro Aug. Pitlík, dir. de SKED, kaj dro Stan. Kamarýt, instr. de SKED, fariĝis dum la jaro 1953, sepdekjaruloj.
Magda Seppová, instr. de SKED, fariĝis en junio 1953 doktoro de filozofio.
Al ĉiuj ni sincere bondeziras!

Kio estas kolegio.

Kolegio ne estas kutimaj kursoj de iu lingvo, sed ĝi estas instituto – duagrada lernejo kun speciala instrumetodo kaj kvalifikaj instruistoj. Ne misuzu tiun ĉi nomon!

PLEJ GRANDAJN SUKCESOJN AL ĈIU SKED-FAMILIANO EN LA NOVA JARO DEZIRAS
LA REDAKCIO.

Praha, januaro 1954

Redaktis A. S.

Verda Voĉo

INFORMA INSTRUA KAJ AMUZA BULTENO DE SOMERA ESPERANTO-KOLEGIO

REMEMOROJ KAJ PLANOJ

Somera kolegio de Esperanto en Doksy naskiĝis el modesta entuziasmo de kelkaj samideanoj, kiuj ekdecidis en la j. 1946 aranĝi somerajn kursojn de la lingvo en loko, kie ĉiujare pasigas miloj da niaj laboruloj feliĉajn tagojn de sia libertempo. Ankaŭ multe da adeptoj de niaj kursoj travivis sian forpermeson apud la lago de Mácha kaj najbara ĉirkaŭaĵo, plena de naturaj belaĵoj. Sed krom tiu naturbeleco de la ripozamuza medio ekzistis io alia, kio multajn ravis - nome la jam antaŭe fama societemo kaj sincera kamarademo de la esperantista popolo, kiu sciis krei belan atmosferon de interkompreno kaj reciproka amo. Vere ne eblas per kelkaj alineoj sufiĉe priskribi ĉion, kio agrabligis al niaj esperantaj gastoj ties loĝadon en Doksy dum 7 jaroj de 1946 ĝis 1952. Certe tion faris zorgeme kaj bonfakte gviditaj kursoj, amuz- kaj instruprogramoj, teatraĵoj, filmoj kaj koncertoj, banado en la lago kaj scenoriĉaj promenoj, sorĉistaj vesperprogramoj, gajaj dancvesperetoj sub la kastelo Bezděz, „veneciaj” noktoj sur lampionigitaj lagoŝipoj, bivakaj fajroj kun impresaj kantoj kaj bonhumoraj scenetoj, autobusekskursoj ktp. Sed ĉefe kontribuis la unika eco de niaj samideanoj, kiuj ofte sciis kvazaŭ spontane fariĝi kunkreantoj de ĝuste plej belaj programoj. Organizantoj de SKED klopodadis transporti similajn kursaranĝojn ankaŭ al aliaj lokoj (Svit, Poprad, Kost). Ĉiuj ĉi kursoj sendube ĝuis sukceson kaj siamaniere estis belaj kaj neforgeseblaj. Sed nenie aliloke oni povis satpetoli kaj satridi tiom kuraĝe bele kiom en Doksy. De tie ĉi disiradis regule gesamideanoj kun dolĉaj sentoj pri ĵusligitaj amikecoj, havante ofte larmoplenajn okulojn.

Ni foliumas tra nia korespondaĵ- kaj fotografajarkivo. Antaŭ niaj okuloj defiladas centoj da afablaj vizaĝoj kaj miloj da etaj historietoj. Ni rememoras la eksterlandajn gastojn, ni travivas vaporŝipveturon al Hřensko... Revenos refoje la sunaj tagoj ĉe la lago kaj kun ili ĉio bela, kion vi primemoras. Post unujara paŭzo reviviĝos DOKSY pe esperanta susurado de sablobordaj pinarboj, parkaj kverkoj kaj blankaj betuloj.

Intertempe nia esperantista tendaro diligente laboras por atingi altan celon, indikitan de nia Majstro. Eblecoj de porpaca laboro ricevis lastatempe vere viglan injekton en formo de fondiĝo de „Mondpaca Esperantista Movado”. Esperanto sin montris ĉiam taŭga nor noblaj celoj. Oni apenaŭ konas pli altan celon ol povi defendi la Pacon. Tial ek al la pacesperanta movado kaj tiubaze ankaŭ ek al DOKSY 1954!

Ŝo

SKRIBU AL MI LETERON

Mi rememoras vin senĉese,
matene, tage, noktomeze.

En mia koro amo ardas,
mi vian foton rerigardas;

la sorton mi demandas febre,
sed ĉio mutas mortfunebre.

Tamen mi havas vivesperon:
vi eble skribos amleteron...

Eble, vi kara, ĝin jam sendas . . .
Ho, vikle, vikle, mi atendas . . .

K. Piĉ

DOKSA "SUNO"

Antaŭ mi sur la tablo kuŝas folio de la "Verda Voĉo", anoncanta, ke ĉi-jare denove okazos la someraj kursoj de Esperanto en Doksy. - Aĥ, Doksy! - mi enpenŝiĝas . . .

Mi sentas min en varma ĉirkaŭpreno de suno, mi flaras la malsekan parfumon de la vespera lago, sed antaŭ ĉio aŭdiĝas en miaj oreloj la kara lingvo Esperanto. Nur tiu, kiu partoprenis la somerajn kursojn, povas kompreni la koran amikecon, ligantan la lernantojn kun la instruistoj, la puran ĝojon akompanantan ĉiun komunan amuzon, la klopodon ellerni la verdan lingvon, sed antaŭ ĉio la homan fratecon, penetrigintan profunden en la korojn. Esperanto estis ja kreita por helpi tiujn, kiuj helpon bezonas, ĝi ja naskiĝis el animo plena de amo al homoj! Kaj ĉion ĉi ni plej bone konsciiĝas ĝuste en Doksy. Amaseto da homoj, venintaj el diversaj anguloj de nia ŝtato, renkontiĝas por pasigi semajnojn en suna kunvivado, kaj foriras por rememori dum la tuta jaro. Ĉu eblus forgesi la antaŭtagmezan instruadon, la junajn vizaĝojn, karesatajn de la suno, kies radioj penetras tra la malfermita fenestro? Aŭ la lagon, sur kies bordo en la plej beleta angulo flagras la verda flago kaj ĝia stelo brilas . . . ? La ekskursojn, la karnavalon kun juna rido, la melankolian sorĉon de la venecia nokto sur la lago, la kantojn, la absolutan feliĉon de tiuj du semajnoj?

Kaj tial mi, pensante pri Doksy, sentas antaŭ ĉio la sunon: sunon en la klasoj, sur la lago, en la koroj kaj okuloj – sunon, multe da suno, multe da homa varmo, kiun ni ĉiuj ja tiom bezonas . . .

Su

ESPERANTO – VIVANTA LINGVO DE LA PRAKTIKO

Pri ĉi tiu fakto skribas Enfried Malmgren, prezidanto de la Universala Esperanto-Asocio, en la antaŭparolo de la UEA-jarlibro por la jaro 1954 la jenon:

"Nia strebado de pluraj jaroj estas montri al la publiko, ke Esperanto ne plu estas iu projekto de internacia lingvo, sed kiel vivanta lingvo jam de jardekoj uzata de pluraj centmiloj da homoj, kiu nombro kreskas de jaro al jaro. Nia strebado estas montri, ke por la esperantistoj la internacia lingvo estas natura kaj plej konvena ilo por la interkompreniĝo, ke la esperantistoj malofte cerbumas en la studĉambro pri la teoriaj kvalitoj de la lingvo, sed ke uzas ĝin en la praktiko: en la legado de gazetoj kaj libroj, en korespondado kaj konversacio kun alinacianoj, en internaciaj kursoj, konferencoj kaj kongresoj."

LETNÍ KOLEJ ESPERANTA

spolu s Okresním výborem obránců míru v Doksech uspořádá ve dnech 25. července až 8. srpna t.r. v Doksech;

1. kursy: kurs základní (náznornou esper. Ĉe-metodou) pro začátečníky, kurs pokračovací, konverŝační, řečnícký a esperantský seminář (pro znalé esperanta a učitele esperanta) s přednáškami z esperantologie, esperantismu, o esper. hnutí a literatuře.

2. společenské podniky: umělecká akademie, letní karneval, benátská noc na jezeře, odpolední výlet na hrad Bezděz, celodenní autokarový výlet a j. Odpoledne pobyt na rozsáhlé pláži jezera, koupání, vycházky do okolních lesů a j.

O ubytování, stravování, kolejném, jakož i o způsobu přihlášky a platby najdete informace v květnovém čísle VV popř. v prospektu, jenž vyjde později.

O slevu jízdného na drahách bude zažádáno. - Státní spořitelna v Doksech zavedla účelové spoření pro účastníky kursů LKED. Vyžádejte si příslušnou informaci! (Adresa dotazů: Letní kolej esperanta, Doksy u Máchova jezera, k rukám. řed. Státní spořitelny s. V. Špůra.)

Praha, marto 1954

Eldonkvanto: 900 ekzempleroj

Verda Voĉo

INFORMA INSTRUA KAJ AMUZA BULTENO DE SOMERA ESPERANTO-KOLEGIO

DOKSY EN LA LITERATURO

La kolegia vivo en Doksy, ĉirkaŭvualita per naturaj belaĵoj de La Mácha-lago kaj per la historio de la kastelruino Beděz, inspiras la pli perceptemajn, sentemajn kaj romantikajn gelernantojn de la Somera kolegio de Esperanto esprimi siajn impresojn en versoj, kantoj kaj prozo. Doksy trovis jam siajn poetojn, literaturistojn kaj komponistojn! Estas jam konataj 23 poemoj de naŭ aŭtoroj, el kiuj 9 estas esperantaj, 6 tradukitaj esperanten el la ĉeĥa lingvo, 7 ĉeĥlingvaj kaj unu desegnita sen vortoj. 3 el ili estas komponitaj. Laŭnhave ili estas plejparte lirikaj, kelkaj el ili okazaj. Sed multaj estas ankoraŭ poemoj pri „Doksy“, kiuj restis kaŝitaj al la publiko en memorlibroj kaj korespondaĵoj de la lernantaro! Eĉ al la prozo „Doksy“ disponigas taŭgan materialon, kiel atestas vico de literature valoraj artikoloj, publikigitaj en la kolegia bulteno „Verda Voĉo“, kie aperis ankaŭ la plejparto de la pridoksaj poemoj, el kiuj staru ĉi-sube kelkaj specimenoj de iliaj unuaj strofoj:

Sur la lago de Mácha:

Ha, lago de Mácha, la amopoet'
„Kun mi en la barkon rapidu,
mi vian hararon orblondan, knabin'
trempiĝi ne lasos - min fidu!“....

Pedagogia hundo „Ĉe-besto.“:

Jen aminda hundeto
kun amika rideto
ĝi nek bojas, ĝi nek mordas
ĝi ne etas danĝera
La vosteton eksvingante
ĝi salutas esperante.
Esperante?
Kuraĝe kaj elegante!

En la doksa kastelo:

Mi sidas ĉe malnova tablo,
ĉe kiu iam markizin'
juna kun arda amkapablo
skribis: „Mi, kara, amas vin!“
al viro, kiu eble dume
- ie en fora malproksim' -
al la alia amindume
ame mensogis sen inklin' ...

Al la maskitino „Kiu?“:

Ĉe maska bal' en Doksy
mi vin al kor' alpremis,
ulin' altira!
Kaj sekvis amdeklaro;
ĝin diktis la delonga inklin' sopira....

Ni ree „doksas“:

Sepan jaron jam en Doksy
brilas stel' de l' Esperant'
ĉie flirtas verdaj flagoj,
ĉie sonas nia kant'....

Našemu drahému časopisu:

Ty náš milý „Verda Voĉo“
budiĝ námi veleben
jak ve Svitu, v Doksech, doma,
všude nám vždy zjasníš den.....

La malliberulo en Bezděz:

Refoje ĉe l' fenestro? Ree vagas
la meditante mens' en fora spac' ?
Vizitojn lasu, kiujn vi imagas,
amuzu vin per tiu ĉi donac' !
Vi ravis pri kverkejo subkastela
kaj pri tiea birda voĉo bela;
de mi akcepti do ĉi kanton volu,
ĝi plezurigu vin kaj vin konsolu!"....

Sobotní rozloučení:

Smutek pad na celé Doksy.
Co se stalo? Co to je?
Ach, to škola esperantská
kufry sobě pakuje....

Kiom da impresoj en ĉi tiuj kelkaj titoloj kaj versoj, kion signifis kaj signifas por ĉsl. esperantistoj Doksy kaj ĝia Somera kolegio de Esperanto!

Pi

Letní kolej esperanta v Doksech

25.VII. - 7.VIII. 1954.

Místní osvětová beseda uspořádá ve dnech 25.VII.-7.VIII. t.r.pod záštitou Okresního výboru obránců míru a za spolupráce stálého přípravného výboru L.K.E.D. tyto kursy: A.základní (pro začátečníky-zábavnou názornou methodou), B. pokračovací, C. konverzační, D. seminář pro vyspělé s přednáškami z esperantologie, esperantismu, o esper. hnutí a literatuře, E. řečnický a o umění jednati s lidmi (pro účastníky kursů C a D). Frekventanti obdrží kolejní osvědčení o návštěvě kursů.Vyučování bude doplňováno společenskými podniky jako jsou umělecká akademie, letní karneval, benátská noc na jezeře, odpolední výlet na hrad Bezděz s tancem, pobyt na rozsáhlých plážích jezera, koupání, vycházky do okolních lesů, celodenní autokarový výlet "Českým rájem" a j.

Počet účastníků omezen. Podejte přihlášku ve svém zájmu co nejdříve, nejpozději do 5.července! Přihlášky jsou závazné, kolejně nutno uhraditi současně s přihláškou. Kolejně včetně vstupného na společenské a zábavní podniky, permanentního vstupného k jezeru, poplatku za odvoz zavazadel z nádraží, osvědčení, režijního příspěvku a byt činí: v soukromí 282 Kčs, v hotelu 321 Kčs; polodenní autokarový výlet včetně vstupného 51 Kčs, zájezd na Bezděz včetně vstupného 9 Kčs. Ubytování žactva obstará Kolej v hotelu neb soukromí. Letním hostům se ubytování neobstarává. Stravování Kolej neobstarává; účastníci si je zajistí v místních restauracích dle své volby. O slevu jízdného na dráze požádáno. Vyžádejte si po 20.V. tištěný prospekt, v němž jsou m.j. též zprávy o způsobu platby a tiskopis přihlášky! Státní spořitelna v Doksech zavedla účelové spoření pro účastníky kursů. Mnoho jich již spoří! Vyžádejte si příslušnou informaci!- Adresa dotazů a přihlášek: Letní kolej esperanta v Doksech u Máchova jezera.Telefon 393.

Květinové hry (Floraj ludoj)1954. Jako v minulých letech uspořádá LKED během kursů literární soutěž esperantských původních i do esperanta přeložených významnějších českých

prací (ve verši i prose), dosud v espu netištěných. Soutěže mohou se účastniti jen žáci a účastníci letošních kursů (nikoli přespolní esperantisté). Laureáti soutěže obdrží diplom, květiny a peněžní dar. Práce (ve verši i próse) třeba zaslati do 15.VII. k rukám Dr. A. Pitlíka, Praha II. Křemencová 21.

Týdenní kulturně-rekreační seminář na Kosti v Českém ráji uspořádají od 8.-15. srpna t.r. Z.K."ROH"Automobilově závody v Mladé Boleslavi za součinnosti Letní koleje esperanta v Doksech. Ubytování v hotelích "Vzlet" a "Český ráj". Mimo esp. seminář výlety po Českém ráji, koupání, večer zábavné programy a tanec. Cena, zahrnující účast v semináři, ubytování (mimo stravování), a režii večerních zábavních podniků činí 136 Kčs. O slevu na dráze zažádáno. Počet účastníků omezen. Podejte ihned přihlášku! Na přihlášky, nekryté patřičným obnosem, nebude vzat zřetel. Vyžádejte si prospekt a složenku po př. další informace u K. Šolce, Mladá Boleslav III. Janáčkova 566.

Diversaj informoj: St. Knížek, lerneja eksdirektoro, UEA-delegito en Liberec kaj eksperanto dě SKED mortis. Al liaj parencoj ni esprimas nian profundan kondolencon.—MUDr. Frant. Vaněk la 28.-.III.54 festis sian sepdekan jaron. Li estas malnova pioniro de Esp. kaj eksinstruisto de SKED. Multe da sano en pluaj jaroj! — Marta Štěpánková, členka Esper. klubu v Hradci Králové, žačka LKED a Jar. Vachek měli 15.III.54 svatbu na Staroměstské radnici v Praze. Za Kolej byl přítomen Dr. Pitlík, jenž při gratulaci zeptal se ženicha, zda je též espistou. Odpověď zněla: "Co nebylo, může být." - Mnoho štěstí oběma v novém životě! — Doksy v Praze: 31. III. konal se v pražském Esp. klubu propagační večer o Doksech a jejich Letní koleji esp. Na programu se podíleli J. Vitek, A. Slanina, V. Špůr, Dr. A. Pitlík a Eva Suchardová, jež přednesla některé básně o Doksech, o nichž byl promítnut film. Večer byl doplněn výstavkou fotografií.

Esperantista "foireto" en Doksy. Okaze do la esperanta kursaro (25. 7.-7.8.) oni aranĝos esperantistan foireton, kie oni disvendados esperantajn librojn, alportotajn de la ĉeestantaro.

Venonta numero de V.V. aperos kiel aldono de la junia numero de la kluba Bulteno.

Praha, majo 1954.

Verda Voĉo

INFORMA INSTRUA KAJ AMUZA BULTENO DE SOMERA ESPERANTO-KOLEGIO

SPIRITA VIGLECO KONSERVAS JUNECON.

La deziro de ĉiu homo estas resti daŭre juna. Al tiu ĉi celo helpas multe la sporto. Sed sportado estas nur unuflanka kaj multaj homoj eĉ tro taksas ĝian efikon. Oni forgesas la fakton, ke estas spirito, la spirita vigleco, kio igas homojn junaj. Kaj mi asertas, ke precipe tiu ĉi spirita vigleco estas multe pli grava ol multaj ne nocie uzataj sportoj. La bona ekzemplo estu al ni vivo de multaj eminentaj homoj. La penso (ideo) estas kreanta forto, tion ni ne forgesu. Ĉio farita ĉirkaŭ ni, naskiĝis antaŭe en spirito kaj fizikaj fortoj nur plenumis tion, kion forta spirito ordonis. Per sporto ni kulturu ne nur la korpon, sed ankaŭ la spiriton. Nia refreŝiĝo estu ambaŭflanka.

Somera Kolegio de Esperanto en Doksy havas ĉiujn eblecojn por plena refreŝiĝo al ĉiuj partoprenantoj. Vi ne nur povos tie sportadi (bani vin, tenis-ludi, turist-ekskursi ktp.) por refreŝigi vian korpon, sed per studo en diversaj esp. kursoj vi refreŝigos vian spiriton, vian kapablon paroli en Esperanto. Kaj restado en amika, preskaŭ familia rondo de esperantistoj refreŝigos ankaŭ vian animon, la animon, kiu serĉas komprenon.

Venu al Doksy por travivi neforgeseblajn tagojn. Kaj tiu, kiu el vi havas pli multe da tempo, venu ankaŭ al Kost, kie, tuj post fino de la kursoj en Doksy, komencas seminario kaj turismaj ekskursoj. Vi poste revenos freŝaj korpe kaj spirite, plenaj de entuziasmo al ĉiutaga porpana laboro kaj al tiu poresperanta.

Venu, ni ĝoje vin atendas! Ant.Slanina.

MEMORO PRI MORTA POETO

Ĉe ponto, kie stel' pereas en profundo,
Ĉe ponto, kie ekhaltiĝis la sekundo,
kantinto morta kun krevita mandolin'
„ - Ĉu aŭdis vi?“ - demandis tre silente min.

Kaj io sonis inter la ĉiel' kaj tero,
per zumzumado mola tintis atmosfero
kantinto morta terenfalas pro la kant',
dormanta en branĉaro kiel konsolant'.
Kaj super la kantinto liaj vivaj kordoj
ekĝemis kiel kruc' sonanta en agordoj.
Kaŝita en malluma horo de aŭtun'
" - Ĉu aŭdas vi?" - la ombromi demandas nun.

Eva Suchardová

SOMERA KOLEGIO DE ESPERANTO - DOKSY - LETNÍ KOLEJ ESPERANTA .

25.7.-7.8.1954.

Místní osvětová beseda v Doksech uspořádá pod záštitou okresního výbor, obránců míru v Doksech za spolupráce stálého přípravného výboru Letní koleje esperanta ve dnech 25.7-7.8. tyto kursy: A. základní (pro začátečníky, zábavnou a názornou methodou), B. pokračovací, C. konverzační, D. seminář pro vyspělé s přednáškami z esperantologie, esperantismu, o esper. hnutí a literatuře, E. řečnický a o umění jednati s lidmi (pro účastníky kursů C a D, spojených na vyhrazené hodiny). Frekventanti obdrží kolejní vysvědčení o návštěvě kursů ještě před odjezdem.

Dopoledne kursy, odpoledne rekreace na plážích u Máchova jezera (České moře) a vycházky do rozsáhlých lesů, večer zábava (společenské a zábavné podniky). V neděli 1.8. celodenní autokarový výlet do Liberce (nikoliv do Českého ráje), kde návštěva zoologické zahrady a lanovkou na Ještěd (1010m). V prvním týdnu odpo. výlet na Bezděz se scénou z básně Svat. Čecha "Vězeň na Bezdězi" a s tancem v podhradí. -

Příjezd do Doks a začátek ubytování v neděli 25.7., odjezd v sobotu 7.8. 50% sleva na dráze. - Přihlášky do 5. července 1954 jsou závazné, kolejné nutno uhradit současně. Přihlášeným budou 18.7. zaslány průkazky, slevenky a podrobné informace. Neurgujte je! - Zahajovací večer v neděli 25.7. ve 21 hodin v Osvětovém domě. - Ubytování obstará kolej (hotel, soukromí). Stravování kolej neobstarává. Účastníci si je sami zajistí v místních rest. podnicích dle své volby. - Kolejné, jež nutno uhradit současně s přihláškou, činí včetně vstupného na spol. a zábavné podniky permanentku k jezeru, za odvoz zavazadel z nádraží, osvědčení, rež. příspěvek a byt v soukromí 282 Kčs, v hotelu 321 Kč. Zájezdy Bezděz, Ještěd včetně vstupného a lanovky (Liberec zoo) 60 Kčs. Všechny platby třeba zaslati na účet Letní koleje esperanta č. 2240 u Státní spořitelny v Doksech (účet č. 237002 u SBČs Doksy-směrovací znak 0603-1). Vkusný, barevný prospekt LKED vyšel. V něm oficiální přihláška, kterou každý (třeba již provisorně přihlášený) musí vyplnit a zaslati Letní koleji, esp. v Doksech (V. Špür, telefon č. 393). Vyžádejte si prospekt ! Počet účastníků omezen! Podejte proto přihlášku ve svém zájmu co nejdříve!

TÝDENNÍ KULTURNĚ-REKREAČNÍ SEMINÁŘ ESPERANTISTŮ NA KOSTI V ČESKÉM RÁJI.

8.-8.-15.8.1954.

Esperantský přednáškový seminář - výlety napříč Českým rájem - koupání - večery zábavného programu a tance. Dodatkem ke zprávě v květnovém č. V.V. se sděluje: Účastníci mají 50% slevu na dráze. Kolejné s hotelovým ubytováním (mimo stravné) včetně večerních zábav a podniků činí 136 Kčs. Počet účastníků omezen na 50! Vyžádejte si tištěný prospekt, v němž je oficiální přihláška, kterou je nutno vyplnit a s urychlením zaslat na adresu: Karel Šolc, Mladá Boleslav, Janáčkova 566/III.

VI. BELARTA KONKURSO "FLORAJ LUDOJ" (Květinové hry) EN DOKSY 1954.

Dodatkem ke zprávě v květnovém V.V. se sděluje, že práce je nutno podepsati značkou, jež souhlasí se značkou na přiložené obálce, obsahující pisatelovu adresu. Příspěvky došlé po 15.7., po př. obsahující pravopisné chyby, jsou ze soutěže vyloučeny. Výsledek soutěže bude veřejně oznámen akademii LKED.

ESPERANTSKÉ DIVADELNÍ AKTOVKY V LETOŠNÍCH "DOKSECH" .

Letos budou sehrány za kolejních kursů dvě esperantské aktovky, napsané sam. Ant. Seemannem a E. Suchardovou: 1. "Mi esperas", drama o 1 dějství o Dru Zamenhofovi. Děj ve Varšavě r. 1888. 2. "Korespondu", jednoaktová komedie. Osoby: Pierre, Henri, Lisa, jeho žena, Inéz, španělská esp. korespondentka. Odehrává se v Paříži.

NOVAĴOJ DE SKED

Al Somera Kolegio de Esperanto en Doksy jam aliĝis 40 personoj.

Krom aliaj aranĝoj oni preparas: "Venecian nokton" sur la lago kaj "Someran karnavalon". Partoprenantoj, ne forgesu kunporti maskojn!

Oratora kurso estos nulte pli riĉa. Ne preterpasu la okazon fariĝi oratoro. Nia devizo estas: Ni bezonas ne nur skribantajn kaj legantajn (elegantajn) esperantistojn, sed ankaŭ parolantajn! Kiu volas propagandi Esperanton, devas ĝin flue regi! Ne estu eternaj komencantoj! Preparu viajn temojn al diskuto!

"Verda Voĉo dum SKED aperos ĉiutage. Ni serĉas spertajn kunlaborantojn.

Venonta numero de "Verda Voĉo" aperos jam dum SKED.

Praha, junio 1954.

Verda Voĉo de Doksy

INFORMATIVNÍ, POUČNÝ A ZÁBAVNÝ OBĚŽNÍK LETNÍ KOLEJE ESPERANTA V DOKSECH
INFORMA INSTRUA KAJ AMUZA BULTENO DE SOMERA ESPERANTO-KOLEGIO

Unua numero en Doksy

28.7. 1954.

Aperas laŭbezone.

ESPERANTEM ZA SVĚTOVÝ MÍR!

Sešli jsme se zde v Doksech nejen abychom si osvojili znalost mezinárodního jazyka, ale též proto, abychom se zde naučili jak tento jazyk, který nám poskytuje možnost se dorozumět s esperantisty celého světa, prakticky používat k propagaci míru a socialistického budování a abychom otevírali oči všem těm, kteří za našimi hranicemi jako nepřátelé pokrcku a míru hanobí a pomlouvají naši republiku.

Světové hnutí esp. obránců míru, které se ve všech zemích zapojuje do akcí Svět.rady míru a snaží se dle daných možností plnit a prosazovat její resoluce a pokyny, očekává, že i v Československu počet našich bojovníků vzroste a že i vy, kteří projdete esp. seminářem v Doksech, se zapojíte do aktivní činnosti a budete plnit úkoly, které esperantu určil jeho tvůrce Dr. L. L. Zamenhof.

Myslím, že v dnešní době není čestnějšího úkolu pro skutečného esperantistu, než dát tento ideální jazyk clo služeb míru, varovat své přátele za hranicemi, kteří jsou ještě ovlivňováni kapitalistickými a reakčními živly, před hroznou katastrofou, která hrozí veškerému lidstvu a nedopustit, aby se podařilo inscenovat novou válku, válku atomovou a vodíkovou zbraní.

Esperantisté to musí považovat za velikou čest, že je jim dána možnost se zapojit do tohoto velikého boje!

R. Burda

GEORGINO

Sub blua firmamento,
sub freŝa, varma vento,
sur griza voj' vi iros,

Mantelo via tremas,
vi herbon piedpremas,
printempa suno miras.

Kaj mi vin vane gardas
kaj vane vin rigardas
kaj vane post vi diras:

"Restu por mia ĝojo
momenton sur la vojo,
ĉar mi vin priadmiras!"

Sed vi min ne atendas,
vin mia voĉ' ne tendas,
vin fremda vir' altiras.

Kaj vi nur sub la vento
kaj sub la firmajmento
plu pasas kaj - foriras...

Karolo Piĉ

BONVENON EN DOKSY 1954

Post dujara longa paŭzo,
monreforma poŝa taŭzo,
en sunŝpara nuba tago
rekunvenas ni ĉe l' lago.
Se ankoraŭ ne plennombre
venis ni kaj eĉ se ombre
Sankta Petro nubojn sendas,
ni ne grumblas kaj ne plendas.

Nia verda rond' fidela
la kuneston igos bela
kaj al ĉiu ĝojon trudos,
ke ni kun amuzo studos.
Do el ĝi ne trist' rezultas
nia vic' ke malpli multas:
kulpas ĝin la cirkonstancoj!
Vivu Doksy kaj vakancoj!

Jiří Kořínek 25.7. 1954.

KRONIKO

La 25an de julio 1954 do rekomencas SEKD sian naŭan kursaron. 3-a tago avara je suno, sed nuboriĉa, la sekretario de la kolegio, la sinofera samideano Pytloun, akceptadis en ia stacidomo la alvenantajn kolegianojn kaj asignis al ili la loĝejojn. Unuopuloj alvenis jam sabate, sed la ĉefa fluso venis dimanĉe kaj ĉio estis glate solvita, du tri malkonkentoj koncerne enloĝigon estis ankoraŭ samtage de s-ano Ŝpŭr likviditaj.

Vespere je la 21a horo kolektiĝis en Kultura Domo ĉiuj alvenintoj por malferma soleno. La vizaĝoj radiis, la malnovaj konatoj intersalutis. Oni vidis fidelajn realvenantojn, kiujn la Macha-lago, la amika medio de la kolegio kaj la ĝoja etoso potence ĉiam kaj ree logas.

Ĉe la prezida tablo en la plaĉa, verdflage ornamita salono eksidis la instruista kolektivo kaj du reprezentantoj de lokaj instancoj. En enkondukaj vortoj s-ano Ŝpŭr, la oferema aganto sur kies ŝultroj kuŝas plejparto de la antaŭpreparaj kaj postokazaj zorgoj, emfazis la tradicion de Somera Esperanto kolegio en Doksy, ĝian meritan laboron. Li prezentis la membrojn de la instruista anaro, postkiam li bonvenigis la ĉeestantojn kaj salutis la oficialajn reprezentantojn. Li transdonis parolon al s-ano Rudolf Burda, kiu en siaj vortoj kaj sia funkcio de prezidanto de Tutmonda Organizo de Pacbatalantoj eldiris konvinkon, ke Esperanto estos baldaŭ rekonata kiel efika rimedo por sekurigi daŭran pacon. Samideano Burda en sia parolo plue diris, ke senfrukta uzado de Esperanto por iaj bildkartkolektulaj au aliaj vantaj celo baldaŭ degradus ĝin kaj starigus nin al nivelo de kuniklobredantoj, ŝakistoj kaj aliaj distraj marotoj. Sed la tasko de Internacia Lingvo estas multe pli granda kaj li montris je ekzemploj el Plzeň, kiel praktike ni povas ĝin servigi al socialismo.

Poste reprezentanto de pacdefendantoj k-do Tvrdek denove substrekiis la vortojn de s-anoj Ŝpŭr kaj Burda kaj deziris, ke Esperanto fariĝu potenca ilo al tiu celo kaj deziris al la kolegio multan sukceson. Prezidanto de la fako por kulturo kaj eduko ĉe Distrikta Nacia Komitato k-do Miĉík en elokventa oratoraĵo atentigis, ke ni devas eluzi la grandan disvastiĝon de Esperanto por refuti kalumniojn kontraŭ nia lando, por montri niajn sukcesojn kaj progresojn kaj por paralizi la agadon de militinstigantoj. Li promesis subtenon al tia nia agado kaj diris, ke Doksy planas grandskalan elkonstruon kaj kiam okazos la 15a SKED, ke la lokaj cirkonstancoj estos jam multe pli favoraj. S-ano Ŝpŭr dankis elkore por liaj vortoj kaj promesis, ke ni en nia porpaca laboro lin ne senravigos. La direktoro de la kolegio Dro A. Pitlík diris, ke li jam 52 jarojn praktikas la lingvon kaj uzas por Zamenhofaj pacaj idealoj. Li diris, ke nia laboro prava, ĝusta kaj nia klopodado ne estas dependa de event. sukceso aŭ malsukceso ĉe Unesko. Li diris, ke Esperanto estas edifa, saniga kaj juniga lingvo kaj afero, kion pruvas lia ĵus hieraŭa 71a naskiĝtago en plena sano kaj laboremo, kion ĉiuj ĉeestantoj tondre aplaŭdis, same kiel la antaŭajn alparolojn. Poste la instruantoj Josef Vítek, Fr. Pytloun, Václav Ŝpŭr, Eva Suchardová, Ant. Slanina, Karel Šolc kaj Jiří Kořínek salutis en mallongaj alparoloj la kursanojn. Speciale estis salutita la 81jara s-ano Kremm el Košice. Post kelkaj administraj sciigoj la kolegianoj disiris post la 23a horo al siaj hejmoj.

Lunde je la 19a horo kunvenis plennombre la kursanoj en la plej granda klasĉambro por improvizita amuzvespero. La sparkanta sprito de niaj neelĉerpeblaj idefontoj s-anoj Slanina, Rýznar kaj Vítek, gajigis kaj distris dum du horoj ĉiujn kaj ĉiam denove ektondris elkore rido. La vesperon inde valorigis deklama arto de s-anino Eva Suchardová, la virtuoza pianludo de s-anino Škutová el Ostrava kaj admirinda imitanto de Hurvínek s-ano Chytil el Přerov. Aplauĉdon rikoltis rakontado de gajaj travivaĵoj dum siaj mondvojaĝoj per Esperanto, kiun prezentis direktoro Dro Pitlík. La buntecon de la

programo kompletigis s-ano Seemann. La reĝo de la vespero, la vortpreta programestro Slanina estis „preskaŭ“ rekompencita kise de tri nomtagon festantaj Annetoj. Gajplenaj kaj kontentaj disiris la ĉeestantoj.

J.K.

APERAS UNUA NUMERO DE VERDA VOĈO.

Akceptu ĝin favore. Ĝi estos via sincera amiko kaj post forveturo el Doksy ĝi rememorigos al vi karajn momentojn travivitajn en Doksy. La redaktoro silentas kaj nur tiuj ĉi kelkaj vortoj estu la saluto al vi, karaj (elegantaj) gelegantoj. A. Slanina

PROGRAMO

- 29.7.: Výlet do Liberce a na Ještěd spojený s účastí na vystoupení Čínského armádního souboru. Sraz v 7 hod. před školou.
- 30.7.: "Věčná Eva"-dramatické pásmo v divad. sále "U Jelena" 19,30. Vřele doporučujeme veřejnosti!
- 31.7.: "Večer dobré nálady" Kulturní dům 19,30. Ant. Slanina se svým kolektivem v premier. programu!
- 1.8.: Odp. výlet pod Bezděz. Sraz 15 h. Vede a duchovní občerstvení poskytuje K. Šolc. Večer tanec v restauraci "Pod Bezdězem".
- 2.8.: Lampiónový večer na jezeře.
- 3.8.: Přednáška Dra A. Pitlika "Veselé zážitky z cest po Evropě." Kulturní dům, 19.30.

KLACĀNGULO

LI: Tak v sobotu mi končí kolej!

ŜI: Jak to? Vždyť bude ještě týden!

LI: To je sice pravda, ale na druhý týden již přijede manželka.

En ĉiuj klasoj fervora lernado. La direktoro de la kolegio inspektas kaj en la Verda vendejo trovas la lernantinon Lidka. "Kion vi faras ĉi tie dum la instruado? Kiun kurson vi vizitas?" "Kurson X" sekvas rapida respondo de Lidka. Konsternita demandas ankoraŭ la direktoro: "Kaj kiam ĝi komencas?" "Vespere" denove rapida respondo. La direktoro nun serĉas instruiston, kiu en tiu kurso instruas, ĉar li pri tiu kurso nenion scias!

NOVAĴOJ

La vetero kiel kutime. Pluvos antaŭtagmeze. Posttagmeze regos bela vetero (Validas ĝis event. ŝanĝo). Ni rekomendas: antaŭtagmeze lerni, posttagmeze bani sin, vespere amuzi.

LA KOLEGION SALUTAS:

- Dro Magda Seppová el Bratislava. - Anna Alamo-Sandgren el Svedujo. - Povel Jørgensen el Danujo. Al ĉiuj tri ni reciprokas la salutojn kaj deziras al ili agrablan someron!

ANONCOJ

- Hledám dobrodince, který mi půjčí větší obnos k amortisaci nákupu ve Verda vendejo. Zn."Vděk odměnou".
- Prodám plavky a kouzelné opalovátka neb obojí vyměním za novější nepromokavý plášť. Zn "Ovlivněna počasím"
- Ptáme se, proč ředitel koleje chodí odpoledne spát, když jeho vzezření je zcela sportovní? Posluchačky.
- Helpu, helpu, gekaruloj! Nunjare "knajpas" sam. S. sola. Ĉu neni ŝojigos niajn matenajn horojn?

ZPRÁVY REDAKCE

Budoucí číslo vyjde v sobotu. Příspěvky se přijímají do pátku 11 hod. Hodnotné příspěvky se odměňují. Fotografie samideánek neuveřejňujeme, avšak ponechávají se v osobním, již obsáhlém, albu redaktora!

Příjemný výlet přeje unavený sazeč!

LA AŬTORO DE ESPERANTO.

Ludoviko Lazaro Zamenhof naskiĝis en la urbo Bialystok la 15an de Decembro 1859. Li estis la unua filo de gimnazia instruisto. Jam en sia junaĝo li multe suferis pro la malpaco inter diversaj homoj, ĉar en lia urbo oni parolis kvar lingvojn: rusan, polan, germanan kaj hebrean; kaj li observis, ke la kaŭzo de malkompreno, malestimo kaj malamo estis plej ofte la diverseco de la lingvoj. Tial Zamenhof jam en siaj infanaj jaroj decidis iam liberigi la homojn el tiu ĉi mizero kaj plifeliĉigi ilin, kreante lingvon, kiu povus esti neŭtrala esprimilo por ĉiuj. Jam dum siaj gimnaziaj studoj li komencis ellabori tian lingvon, kaj en 1878 li festis kun kelkaj el siaj kunstudantoj la naskiĝtagon de la "Lingvo Universala". Tiu ĉi projekto jam iom similis al la nuna Esperanto. Dum kelkaj jaroj li ne povis labori pri sia eltrovaĵo, ĉar la medicina studado postulis ĉiujn fortojn kaj atenton. Sed ankaŭ en tiu ĉi tempo li iam kaj iam tradukis tekston en sian lingvon; kaj rimarkinte nepraktikajn vortojn aŭ gramatikajn malfacilaĵojn, li forigis ilin kaj tiel pli kaj pli perfektigis sian projekton. Fine li estiĝis kuracisto. Liaj enspezoj estis ja tre malgrandaj, sed tamen li oferis ilin kun la malmulta mono de sia edzino, por eldoni en 1887 ruslingvan libreton kun la titolo: „Lingvo Internacia. Antaŭparolo kaj plena lernolibro. De Dro. Esperanto." Ĝi entenis la 16 gramatikajn regulojn, vortareton de 900 vortoj kaj tekston el la Biblio, la kristanan preĝon Patro nia, leteron kaj versaĵojn. Tiu ĉi libreto estas la ĝermo, el kiu elkreskis la nuna riĉa literaturo de Esperanto, kiu ampleksas multajn milojn da libroj kaj broŝuroj. Zamenhof havis la ĝojon, vidi la kreskadon de la Esperanto dum 30 jaroj. Lia plej forta doloro estis la eksplodo de la mondmilito en 1914 ĉar li ja esperis, ke la uzado de komuna lingvo farus la homojn pli pacaj kaj amikaj. Sed la Esperanta penso ankoraŭ ne estis sufiĉe disvastigita, por tiel forte efiki. Certe tiu ĉi sperto estas kunkulpa je la tro frua morto de Zamenhof, la 14an de Aprilo en 1917.

Zamenhof estis malgranda viro kun modesta konduto, sed energia volo kaj klara pensado. Laborante por idealaj celoj de la homaro, li malmulte zorgis pri monprofito. Amante la homojn, precipe la malriĉajn kaj suferantajn, kiuj plej multe bezonas amon, li loĝis en la plej mizera kvartalo de Varsovio kaj ofte kuracis senpage la homojn, kiuj ne povis pagi. Tiel li restis malriĉa. Ankaŭ sian eltrovaĵon, la lingvon Esperanto, li donacis al la homaro kaj ne prenis por ĝi iun ajn rajton aŭ profiton. Al ĉiuj, kiuj lin konis, li aperis kiel homo sankta.

Vere la aŭtoro de Esperanto estas unu el la plej noblaj homoj, kiuj iam kaj ie vivis en la mondo.

"...Post multaj miljaroj da reciproka surdamuteco kaj batalado nun en Bulonjo fakte komenciĝas en pli granda mezuro la reciproka kompreniĝado kaj fratiĝado de la diverspopolaj membroj de la homaro; kaj unu fojon komenciĝinte, ĝi jam ne haltos, sed irados antaŭen ĉiam pli kaj pli potence, ĝis la lastaj ombroj de la eterna mallumo malaperos por ĉiam. Benata estu la tago kaj grandaj estu ĝiaj sekvoj!"

Tra densa mallumo briletas la celo
Al kiu kuraĝe ni iras.
Simile al stelo en nokta ĉielo,
Al ni la direkton ĝi diras.

Verda Voĉo de Doksy

INFORMATIVNÍ, POUČNÝ A ZÁBAVNÝ OBĚŽNÍK LETNÍ KOLEJE ESPERANTA V DOKSECH
INFORMA INSTRUA KAJ AMUZA BULTENO DE SOMERA ESPERANTO-KOLEGIO

Dua numero en Doksy

31.7.1954

Aperas laŭbezone.

PŘÍČINA RADOSTI

Jestliže při přehlídce minulého dne shledáte, že jste splnili svůj úkol, vykonali předsevzatou práci, provedli svůj úmysl, máte opravdu příčinu k radosti, neboť jste zvítězili sami nad sebou. Jenom tehdy, když zvítězíte nad svými sklony k pohodlnosti, máte skutečný požitek z vítězství. Je nutno, abyste svou veškerou práci (tedy i učení) dělali zodpovědně, měli k této práci vždy kladný poměr, t.j. abyste mysleli kladně. Myšlenky jsou síly, které mohou pohnout vesmírem. Nelze vytvořit dokonalé dílo, jestliže k němu přistupujeme s nechutí, jaksi z nutnosti. Taková práce (i učení) je povrchní, téměř zbytečné. Odoláte-li sklonům k pohodlnosti, zvítězíte nad sebou, stanete se svobodným a poznáte povznášející pocit z vykonané práce. Bude to ten pravý pocit vítězství!

Konejte vždy vše za určitým cílem! Úspěch člověka nezávisí na štěstí, nýbrž dostaví se zákonitě jako účinek příčin. Chcete-li zastávat zodpovědné místo, vykonat zdárnou práci, prostě chcete-li mít úspěch, musíte věci, kterou konáte, dokonale rozumět. Tak jí rozumět a ji ovládat, abyste mohl tvořit. A pak můžete tvořit nadhodnoty ve prospěch celku.

A až přijдете domů, přehleďte svou práci, kterou jste vykonali v koleji. Byla li to práce poctivá, bude to také jedna z příčin vaší radosti a váš další krok pro mírové budování našeho lepšího života!

Ant. Slanina.

II. NUR UNU VORTO

Antaŭ altan' de Henrieto
staras malnova sidmureto;

ŝtona akvo kun brila fonto,
invitas tie al renkonto;

fajenca musk' en muskornamo
grimacas tie al najado;
ĉio en tiu stranga loko
estas insista al malvoko;
kaj nur mi tie sola sidas
mi ne parolas, mi ne ridas

kaj mi skribas
tranĉile sur la murruino
nur unu vorton: Georgino!

Karolo Píč

LETNÍ KOLEJ ESPERANTA V DOKSECH (SOMERA KOLEGIO DE DOKSY)

25. 7. - 7. 8. 1954

pořádá tyto kursy a přednášky:

A kurs základní (pro začátečníky):

1. Esperantská mluvnice přímou názornou Ĉe-metodou. (Vyučuje K. Šolc a A. Slanina.)
2. 16 pravidel základní esperantské mluvnice Zamenhofovy . (E. Suchardová) Třídní K. Šolc.

B. pokračovací:

1. Opakování esperantské mluvnice. (J. Kořínek)
2. Lehká esperantská konverzace. (E. Suchardová, V. Špůr, J. Vítek). Třídní E. Suchardová.

C konversační:

1. Prohloubení znalosti esp. mluvnice. (J. Kořínek)
2. Těžší esper. konverzace. (E. Suchardová, V. Špůr, J. Vítek)-Třídní J. Vítek.

D. Seminář pro vyspělé: přednášejí:

Dr. A. Pitlík: Historio de la ideo pri universala lingvo. - J. A. Komenský, profeto kaj iniciatinto de 2 projektoj pri lingvo universala. -Internaciaj lingvoj: naciaj lingvoj, dulingvismo, Esperanto. - Esperanto kaj UNESKO. -Esperanta fonetiko. -Evoluo de la lingvo Esperanto (Literaturaj skoloj). - Bazoj de Esperanto (Fundamento de Esperanto , Akademio de E. , Universala Esperanto-Asocio, Universalaj kongresoj). - Zamenhof en siaj leteroj. - Esperanta, literaturo poezia kaj traduka (Malnova parto).

Jiří Kořínek: Kelkaj problemoj gramatikaj. -Fundamentaj reguloj de esp. vortfarado. (Principo de neceso kaj sufiĉo). -Problemoj de tradukanto. - Esperanto kaj poezio. -Lingva riĉeco (Lingvo beletra kaj poezia. Nuanc-riĉeco, sinonimoj, preskaŭsinonimoj. Neologismoj. Diferenco inter riĉigo kaj balasto.) Rimarkindaĵoj de nova esperanta literaturo.

K. Šolc: Ĉe-metodo.

E. Suchardová: Arto de recitado.

K. Píĉ: Kritiko de poezia fakvortaro (Ia kaj Ila parto.)

O. Ginz: Utiligo de Esperanto en nuna tempo. —Kresko de nia literaturo post la milito.

R. Burda: Esperantista pacmovado. (Třídní J. Kořínek.)

E kurs řečnický a umění jednati s lidmi - pro účastníky kursu C a semináře, spojených na vyhrazené hodiny. (A. Slanina, V. Špůr). -Třídní A. Slanina.

Dr. A. Pitlík,
ředitel kursů LKED.

KRONIKO

Marde la 27an ekfavoris nin la ĉiela veterreferento. Kiam pasis la antaŭtagmezaj horoj en diligenta studado kaj la tagmanĝo, komencis kolektiĝi la samideanoj ĉe la lago por fine ekĝui la banadon kaj ripozante sunumi sin en la mola sablo de la strando. Formiĝis grupetoj babilantaj aŭ diskutantaj pri diversaj temoj. Solemuloj elmetis sin al bonfaraj sunradioj aŭ profundiĝis en sian libron. Apude sur roketo ekludis societajn ludojn la junularo nombre superreganta. Miĉda venteto krispigis la verdan vastan akvonivelon kaj antaŭ la malhelverda fono de ĉirkaŭaj arbarkovritaj montetoj intense blankis la veloj de krozantaj velboatoj. Sur la malkruta ĉeborda lagofundo petolis kaj ludis gajaj baniĝantoj kaj en la etgrajna sablo aŭ sur kuŝiloj sorbis la sopiritan sunbrilon bruniĝantaj korpoj.

Vespere en la Kultura Domo prelegis kun lumbildoj s-ano Vítek pri sia vojaĝo al Svedujo kaj Laponujo. Lia viva kaj spritplena, iam vere humora rakontado tenis en streĉa atento ĉiujn ĉeestantojn, kiuj lian belan prelegon kun multaj, plejparte koloraj bildoj, rekompencis per forta aplaŭdo.

Post la ĝuiga vespero manifestiĝis la solidareco de nia verda rondo, kiam el spontanaj donacoj kolektiĝis la sumo de 300 Kč por juna samideanino el Přerov, kiu perdis sian monujon kun tiu sumo, sian tutan monhavaĵon.

Merkrede la 28an estis tago same bela kun ripoziga posttagmezo ĉe lago.

Fungoserĉemuloj preferis vagi tra arbaro, aŭ oni promenis en la bela ĉirkaŭaĵo.

Vespere okazis sub gvido de s-anoj Burda kaj Slanina diskuta vespero. La ĉeftemoj estis, kiel servi Esperanton al la pacdefendanta movado, kiel aranĝi Esperanto-kursojn, kiel fondi Esp. grupojn ĉe uzinaj kluboj aŭ klerigaj asocioj, kiel defendi Esperanton kontraŭ malpravaj atakoj el

vidpunktoj ĝenerala kaj marksisma. Disvolviĝis tre vigla debato kaj diskutado pruvanta la malinertecon de esperantistoj.

Ĵaŭde la 29-an la ĉiam intensa kaj serioza instruado paŭzis. La matena trajno transportis la anaron al la urbo Liberec por tuttaga ekskurso. Per kablovojo oni jam antaŭ tagmezo atingis la supron de la monto Ještěd, de kie ni admiris la belegan panoramon de ĉarme situanta urbo Liberec kun la potenca Jizera-montaro en fono unuflanke kaj la pitoreskan Bohemian Mezmontonon aliflanke. La videblo estis iom ĝenita de nuba vetero. Post tagmanĝo en la hejmeca monthotelo oni revenis al la plaĉaspekta urbo kaj precipe rigardis la riĉe ekipitan zoologian ĝardenon.

La tago estis finita per ĉeesto ĉe la sinprezento de la ensemblo de Ĉina liberiga armeo. En giganta amfiteatra arbara teatro ampleksanta sidlokojn por 60 000 homoj, kiu preskaŭ plenigita de ĉeestantoj el proksimo kaj foro faris potencon impreson, ni povis admiri unu el plej ravaj kaj vidindaj spektakloj. La ega korpuso, konsistanta el ĥoro ĉirkaŭ 100-membra, granda orkestro kaj eminentaj solkantistoj kaj akrobataj dancistoj ravis nin per siaj ĉinaj batalaj kantoj, dancoj, operaj arioj kaj baletaspektaj fragmentoj el ĉinaj klasikaj operoj, kiuj por ni estis laŭ sia fantazio kaj sia ekzotika instrumenta akompano nevidita kuriozaĵo. La salutparolojn akcentatajn ĉinan-ĉeĥoslovakon amikecon, kunagemon kaj pacamon, kaj precipe ĉeĥajn ariojn kaj kantojn de la simpatia ensemblo senriproĉe prezentitaj rekomencis tondra aplaŭdo kaj aklamo.

La belan tagon, por reliefigi la belecon, devis akompani ankaŭ io malagrabra, nome ke ni devis preskaŭ du horojn post la fino atendi la antaŭlonge menditan aŭtobuson, kiu, kvankam starante en la senhomiĝinta strato, ne volis nin fortransporti al Doksy, kaj kies ŝoforo pretekstis, ke li „ne ricevis tiucelan asignon“. Nur post energia interveno foriĝis le danĝero, ke ni venos nur sekvatage hejmen, kaj ni fine, malfrue post noktomezo, sed tamen kontentaj, ankris en niaj litoj.

J.K.

Celodenní výlet do Liberce ve čtvrtek (29.7.) byl zakončen mohutným dojmem, který si odnesli všichni účastníci z vystoupení Sboru písní a tanců čínské osvobozené armády. V jedinečně položeném a obrovském lesním divadle v parku oddechu a kultury bylo shromážděno přes 30 000 nadšených diváků, kteří shlédli představení vskutku jedinečné.

V pozdravu milých hostů bylo bouřlivě aklamováno zdůraznění československého-čínského přátelství a společného boje ze světový mír. V bohatém programu předvedl nám sbor bojové písně čínského lidu z různých provincií, sólové písně, ukázky tanců a úryvky z čínských klasických oper, které působily svojí fantastickou náplní a zvukovým doropovodem vskutku exoticky. To, co členové souboru ukázali v baletu a tanci bylo strhujícím akrobatickým výkonem. Srdečný potlesk přijal české písně a arie v bezvadném provedení.

Vystoupení vyznělo jako velkolepý projev družby a touhy po míru svobodných národů.

SENTENCOJ

Co děláte, musí být správné. Každý čin musí souhlasit s cílem, který jste si vytkli. Pravé ovládání sebe není ovládání nervů, nýbrž ovládání myšlenek. Nepracujeme jen pro odměnu, nýbrž pro radost z práce a úspěchu. Nikdo není dokonalý. Špatné vlastnosti ostatních jsou nezdědkou výsledkem našich vlastních slabostí.

NOVAĴOJ

Počasí: jako obvykle, sam. Špŭr ještĕ nevyzkoušel svŭj elegantnĭ nepromokavŭj plášť, proto občas deštivo. Proto se uvažuje o konání lampiŭnovĕho veĉera s ohňostrojem v Kulturnĭm domĕ. Jednání o příslušné adaptace a převezení vody jezera včetně motor. člunŭ a lodic jsou v proudu. Vyĉkejte výsledkŭ v příštĭm čísle. — —

Telegramo por SKED: La tutŝtata junulara kunveno en Ŝimrovice salutas partoprenantojn de nia kolegio!

S-anino Lída Komzáková, Tábor, Lomena 2014 skribas. Karaj gesamideanoj! Mia koro ploras, ke ĝi ne povas ĉeesti la "doksadon". Mi deziras al vi plej bonan libertempon. Ĉiujn mi kore salutas precipe karan estraron. Kiam ni denove kunvenos!?

Ni respondas: Kara amikino, korajn salutojn. Kompreneble, denove venontjare ni denove kunvenos en Doksy!

Al nia laboro gratulas kaj salutas: Ing. Zdzislaw Glajcar, Cieszyn, Polujo. Kara samideano, ankaŭ ni reciprokas la salutojn kaj admiras vian porpacan laboron.

Salutas la kolegion s-ano B. M. Voshalo el Melbourne, Aŭstralujo, kiu esperas, ke la akvoj de la lago ne elverŝiĝis kaj ne minacas nian laboron! - -

Důležité!

U sam. Pytlouna se denně odevzdávají různé zapomenuté nebo odložené věci (tašky, kabelky a pláště). Protože bývalí majitelé neprojevují zájem, vedení koleje chce při závěru uspořádat dražbu všech těchto předmětů!

KLAĈANGULO

Zdalipak víte, proč jsme se ve čtvrtek tak rychle dostali autobusem z Liberce? To s. Pytloun namazal kola svým chvalným jogurtem. A autobus pak letěl. . . jako mnozí z členů koleje, kteří jogurtu nezřízeně holdovali. Lékařský předpis: kelímek neuškodí pětičlenné rodině. Jinak užívat opatrně! _ _

Samideánka, která se ztratila ve výšce 1010 m je s. Oroszová z Košic. Výbor koleje ji žádá zdvořile, aby po druhé, hodlá-li se ovšem ještě ztratit kolektivu, tak učinila v nižších polohách, neboť její záchránce nesnáší výšky! _ _

Všichni jsou spokojeni se svým ubytováním, což slouží ke cti a chvále sam. Špůrovi. Již jen ojedinele členové koleje ve dne tápají cestou domů, protože je myslí denní světlo. Pro špatné počasí je nutno znát cestu domů ve dne, nejen v noci, Liduško R. !

S. Slanina ve vlaku byl přímo obletován. Důvod lze spatřovat jen v touze po přilepšení k suchému chlebu, který měla většina účastníků. Avšak: i když čerstvá slanina je věru žádoucí, jde pouze o shodu jmen a nic více. Nežádejte nemožné a mějte úctu k stáří (jež zájemcům důvěrně s dalšími podrobnostmi sdělí sazeč)!

Výborným znalcem piva a jeho hodnot je bezpochyby náš učitel Slanina, který v hotelu Bezděz poučoval přítomné o škodlivosti 10% piva vychvaluje 8% plzeňské. Nevěděl, že zlomyslní účastníci mu jeho zamilovaný druh piva zaměnili za shora uvedený nenáviděný druh. Inu, pravděpodobně i on pozná pivo podle ceny při placení!

Důležité upozornenie! Kto si chce zakúpiť medové klobúky, nech si vyžiada informácie v rýchliku Košice-Praha vo vagone Č. B. 022481. So zakúpením sa ponáhľajte, pretože sú k dostaniu len raz za rok. _ _

Exotiku čínskeho večera opravdu krásne doplnil s. Kořínek, který při náhlém lijáku obratně použil plavek na krytí hlavy. Škoda jen, že jeho činnost měla účinný lokální.

Výzva! Hledáme urychleně zpěváky všech hlasů (možných i nemožných, které vyškolíme Če-metodou) pro Vítkův, nikoliv Vítův, jak bylo škodolibě tvrzeno, kolejný soubor. Přihlášení vám potvrdí, že jde o naprostou sensaci! Přihlaste se ihned u s. Vítka, chcete li ukázat své umění v záři reflektorů kolejný akademie, na jejímž programu se horlivě pracuje. - -

Příští číslo vyjde ve středu. Příspěvky redakci do 11 hodin v úterý. Do druhého týdne lepší počasí přeje sazeč.

Verda Voĉo de Doksy

INFORMATIVNÍ, POUČNÝ A ZÁBAVNÝ OBĚŽNÍK LETNÍ KOLEJE ESPERANTA V DOKSECH
INFORMA INSTRUA KAJ AMUZA BULTENO DE SOMERA ESPERANTO-KOLEGIO

Tria numero en Doksy

4.8.1954.

Aperas laŭbezone.

MIAJ IMPRESOJ EL TIUJARA SOMERA KOLEGIO

Ili estas entute agrablaj, kio estas memkomprenebla en tiel simpatia rondo familia, kie unu volas helpi kaj ĝojigi la alian kaj ekplaĉi al li aŭ al ŝi. La plej oportuna kaj agrabla maniero por tiu celo estas laŭ mia opinio la dancvesperoj kaj dum ili sur unua loko dancado de tiel nomata "rekrea mazurko". Dum tiu ĉi danco dimanĉe mi tre juniĝis, ĉar mi sukcesis ricevi ion de ĉarma juna samideanino, kion mi alie neniamaniere atingus. Mi ne diros, kion belan mi ricevis, sed sole mi sufloros, ke tiel estas nomata unu opero de Frederiko Smetana. Jen mia plej intensa impresoj!

A ostatnĵoj? I ty jsou krásné, a to tím spíše, že přišly neočekávaně a náhle. Byl jsem totiž přihlášen na Kost, což ale odpadlo, a já se náhle octl v Doksech, kde před třemi roky jsem prožil nezapomenutelné dojmy družnosti a radostného spoluzití ve velkém kruhu rodinném mezi samideány. Také letošní program díky pořadatelstvu v čele s neúnavným V. Špůrem, D-rem Pitlíkem a A. Slaninou má vysokou úroveň, bystrý spád a rozmanitost nejrůznějších velmi zajímavých temat nejen z oboru Esperanta a esperantismu, nýbrž i temat politicko-vědeckých, náboženských, estetických a filosofických. Velmi zajímavá byla na př. přednáška Dra Pitlíka o jeho cestách po většině evropských zemí před prvou světovou válkou, kdy ve velkých městech propagoval znalosti o tak málo tam tehdy známém našem národě. Náladu účastníků udržuje v dobrém, ba i veselém stavu řada vtipných recitátorů, při čemž nescházejí na jedné straně do hloubky jdoucí výkony herecké, třeba často jen improvizované a v neposlední řadě kouzelnické výkony s. Rýznara.

Hlavně mě vždy potěší, že do našich řad přibývá hojně naše krásná mládež, kterou v jiných kulturních oborech (na př. ve zpěvu a v hudbě), jakožto dorost, který má nahraditi odcházející generaci, marně hledají.

Proto věřím, že Esperanto zvítězí a v nedaleké budoucnosti bude trvale sloužit míru po celém světě.

Dr. Josef Fousek

M I A S C I E M O

Mi volus scii, kie vi nun sidas,
kion vi faras en ĉi tiu hor'
(ĉu vi ne larmas? ĉu vi ne hezitas? .
ĉu vin ne premas timo aŭ angor'?)

Mi volus vidi, kion vi nun faras,
nun en ĉi tiuj horo kaj sekund',
eble kapkline ŝtrumpojn vi riparas
aŭ kudras truon sur malnova punt',
aŭ tute senlabore vi nur sidas,
rigardas ien, ion primeditas ,
kaj lacas kiel ia Proserpin'
Aŭ - ĉu ne vere? - vi bedaŭre ploras,
kiam vi ree, ree rememoras,
ke mi vin iam amis, Georgin'

Karolo Píĉ

KRONIKO

Vendredo, la 30an de julio alportis por la kursanoj surprizan edifon. Post laborplena antaŭtagmezo kaj pluvmorna posttagmezo, ekbrilis granda stelo en vespero. Ĝia nomo estas Eva Suchardová.

En Kultura Domo, en poezia sinsekvo titolita "Věčná Eva" (La eterna Evo) ŝia kulmina arto deklama kaj aktorina en kunlaboro kun eminenta pianistino s-anino Věra Škutová el Ostrava aj s-ano Ant.Seemann defiligis antaŭ ni la glorajn figurojn el gento de Evo. La eterna ravo, la ĉiam nova ĉarmo, la neelkalkulebleco, kapricemo, tenero kaj pasio, sindono kaj trompemo, fideleco kaj perfido de la virino prenis sur sin la diversajn aspektojn de la aktorina artodono de nia Eva.

La sinsekvon enkondukis la triste molaj tonoj de Lento de Chopin sekvitaj de versoj de Fráňa Šrámek "En pluva tag' aŭtuna". La poezia tonpentraĵo "Poem'" de Fibich nin transmetis al tempo biblia. La versoj el ciklo „Pasiono" de Ant.Seemann en emocia prezento de Eva Suchardová vidigis al ni la grandan puran amon de Maria el Magdala al filo de Dio. Sekvis Skerco de Gade kaj poemo de Šrámek "Knabino" kaj la Valso A-maĵora de Brahms sonis prelude al ĉarmaj versoj de Neruda "La fianĉino". S-ano Kubišta poste kantis kun propra pianakompano la popularan kanton de Z. Poděštl "Por ni printempo ne finiĝas". La unuan parton finis Letero de Tatjana de Puŝkin. Post la paŭzo akordoj el Preludio de Chopin enscenigis versojn de Hipodamio el Svatoj de Penelopo. Valso de Durand anticipis la monologon „Elizabeto la Angla" de Machar, en kiu demonstriĝis al ni mortiga krueleco de virino ĵaluzanta. La kortuŝan Serenadon de Schubert postis en ĉarma dono „Manon Lescaut" de V.Nezval. En virtuoza prezento de s-anino Škutová fluis la tonoj de Valso de Dvořák antaŭ la fortaj versoj de K. Wallo „Aktorino skribas". Unikan artodonon postulis la monologa sceno ĉe telefono „La homa voĉo" de Jean Cocteau. En tiu ĉi longa kaj pretenda sceno, kiu draste montras al ni tragedion de virina koro, atingis la deklama kaj aktora arto de s-anino Suchardová apogeon. La ega malfacileco de tiu sceno postulanta enorman memorstreĉon, mimikan, voĉnuacigan kaj deklaman kapablojn, estis tuj evidenta eĉ al nefakulo. Kiam la melodio de Chopin estis ferminta la artvesperon de plej alta nivelo, tondra aplaŭdo rekompencis la majstrinon de la vivanta vorto kaj ŝiajn kulaborantojn. Admirante la nekompereblan arton de Eva Suchardová, ŝian grandegan parkeritan repertuaron, ŝiajn unikajn menskapablojn, ni konscias: ŝi estas unika fenomeno en Esperantujo.

Sabate la 31an de Julio en komuna prelego por la Seminario kaj klaso "C" s. J. Kořínek donis supervidon pri Esperanta poezio. Ankaŭ ĉi tiun temelĉerpan prelegon valorigis la deklama arto de Eva Suchardová, kiu recitis inter la kunligaj vortoj de la preleganto poemojn de Baghy, Kalocsay, Kurzens, Hohlov, Auld »Dinwoodie, Rossetti, Piĉ, Suchardová, Urbanová, Kořínek kaj repoezigojn de Pumpř, Hromada kaj Kořínek. Regis preĝeja silento, kiam nia poetino recitis kaj aklama aplaŭdo vidigis la ekzaltecon kaj entuziasmon de la aŭskultantoj. Modela Esperanto, ekzempla prononcado kaj superba arto ree konvinkis nin, ke ŝia parkera repertuaro membranta centojn da juveloj de Esperanta poezio kaj drama literaturo sekurigis al ŝi glorfamon kaj plej altan aprezon en la tuta mondo, se la cirkonstancoj permesus al ŝi veni al UK kaj ekvojaĝi tra la mondo.

Vespere okazis en Kultura Domo amuza vespero, kies distran programon prizorgis s-ano Slanina kun siaj retrospektj filmoj, nia sorĉisto s-ano Rýznar, nia juna pianistino s-anino Škutová, s-anino Suchardová kaj s-ano Seemann prezentis kun la kutima arto kaj rutino teatran scenon. Post la 23a horo oni disiris al siaj hejmoj.

Dimanĉon la 1an de aŭgusto kompanse por la ĵaŭda tuttaga ekskurso okazis antaŭtagmeza normala instruado. Bela posttagmezo plurajn ellogis al la strando, dum aliaj ekskursis al vilaĝo Bezděz sub la burga ruino, kiu mem nun bedaŭrinde ne estas alirebla. Vespere postvenis la ceteraj kaj ĝuis agrablan dancamuzon en tiea dancĉambrego. En medio vere familia, gaje amika, ĉiu sentis sin feliĉa kaj kontenta. La interdancajn paŭzojn plenigis la memkreska humoro de s-anoj Slanina, Vítek, Rýznar kaj Seeman. S-anino Suchardová regalis nin per perletoj el sia neelĉerpebla memora artprovizo kaj deklamis poemon de Šrámek en ĉeĥa originalo kaj Esp.traduko de s-ano Hromada. La tradicia „rekreanta" mazurko kaj la „Tuketdanco" kun la kisrekompenco parigis la gesamideanojn en plej bunta varieco kaj kaŭzis multe da ĝojo. La aĝolimo ne ekzistis kaj ni vidis la altaĝulonon s-anon dron Fousek, kiu jam alsturmas la 8an jardekon de sia valora vivo, kun 16jara ĉarmulino en imitinda dancelano. En tia sincere amika etoso, kia estas nun en nia verda rondo, oni eĉ forgesis grumbli, kiam la aŭtobuso „ree" malfruiĝis kaj venigis nin al niaj litoj du horojn pli malfrue ol estis projektite.

J.K.

Al ĉiuj esperantistoj!

Nia tasko por la paco estas tiel granda, ke estas necese ĝin iom difini kaj starigi planon por ĝia realigo. Unu afero estas klara, nome tiu, ke unuopulo ne povas fari multon. Inter vi estas membroj, kiuj povas helpi. Ili devas en sia loko fari sian plej eblan laboron. Estas rekomendinde serĉi kontakton kun la ceteraj pacorganizoj.

Tiamaniere ni povus senĝene disvastigi la konon pri taŭgeco de Esperanto kiel internacia komunikilo. Per tio ni povus altiri al nia movado tiujn homojn, kiuj ankoraŭ ne scias Esperanton, aŭ kiuj ankoraŭ ne scias, kion celas Esperanto. Ĉiu esperantisto scias tre bone, ke labori por Esperanto eblas nur la Paco kaj pro tio disponigu viajn fortojn al la organizo de Pacdefendantoj.

En St. Polten, Austrujo, estis fondita "Mondpaca Esperanto Movado", kies Prezidanto estas nia samideano R. Burda el Plzeň. Ni ne nur fieru pro tio, sed ni lin subtenu en lia laboro por la nobla celo!

F. Pytloun

Julius Kubišta

Z mírových veršů

Místo kulek, místo bomb
a místo granátů,
chci cítit pestré lučiny,
květ lip, květ akátů.

Místo krve, místo bomb
a lesku bodáků
na Hradčany dívat se chci
v záři červánků.

Já chci k růži přivonět si,
slyšet ptáčků hlas. . .
Dětské zpěvy poslouchat chci,
budovat svou vlast.

Květ třešní opadáva. . .
A v sněhobílém víru
po krajině poletují
hlasovací lístky míru.

Milý větře, ber ty květy
a roznes je v dálku,
na každém z nich napsáno je:
nikdy, nikdy válku!

SALUTO AL LA UNIVERSALA KONGRESO EN HARLEMO

„Ni kunvenis hodiaŭ, por montri al la mondo per faktoj nerefuteblaj tion, kion la mondo ĝis nun ne volis kredi. Ni montros al la mondo, ke reciproka kompreniĝado inter personoj de malsamaj nacioj estas tute bone atingebla, ke por ĉi tio tute ne estas necese, ke unu popolo humiligu aŭ englutu alian, ke la muroj Inter la popoloj tute ne estas io necesega kaj eterna, ke reciproka kompreniĝado inter kreitaĵoj de tiu sama speco estas ne ia fantazia revo, sed afero tute natura, kiu pro tre bedaŭrindaj kaj hontindaj cirkonstancoj estis nur tre longe prokrastita, sed kiu pli aŭ malpli frue nepre devis veni kaj unu fojon ekirinte, jam ne haltos. . . ”

-- L. L. Zamenhof en Bulonjo 1905

Alojz Kremer

BALADO PRI MIELO

Abelajn familiojn Mario havas tri,
Sed tamen multan penon per ili havas ŝi,
Malgrau la bona flego la bestoj pikas ŝin. -
Mielon - nur malmultan- ŝi gajnis je la fin'.

De tiu malmaltaĵo donacon - en sekret'-;
Kunportis ŝi vojaĝe malgranda en paket'.
Surprizi la amikojn per tio volis ŝi.
La fato do - alian decidis kontraŭ ŝi;
Anstataŭ la amikojn aliajn dum vojaĝ'
Surprizis ne sciante Mari per la dolĉaĵ'.
Fluante el valizo al nun alia cel',
La kapojn kaj ĉapelojn dolĉigis la miel'. -
Alvenis sen mielo, sed kun ĉagren' Mari'. -
Kaj tiel nun finiĝas la trista melodi'.

Rimarko de la redakcio: La balado honore dediĉita al nia persista samideanino Mária Orosová el Košice!

NOVAĴOJ

La vetero, kiel vi jam konstatis, estas bela, dank' al nia redakcio, kies deputito traktis pri ĝi ĉe ĉielaj kompetentuloj. Ĝi estas daŭra - ĝis eventuala ŝanĝo, kiu estas probabla. _

PROGRAMO

Dnes ve středu:

ČAPKŮV VEČER -u Jelena 20 hodin. Vřele doporučujeme veřejnosti tento umělecky vysoce hodnotný večer!

Zítřka ve čtvrtek: Akademio de SKSD kun Floraj Ludoj, Kultura Domo, 20a horo.

Pozítří v pátek: Karnavalo en Zátíší 20a horo. Ĉiu estu maskita! _

SALUTOJ

Partoprenantoj de SKED sendas sinceran kaj koran saluton al gesamideanoj Wiltshire el Novzelando, kiuj en nunaj tagoj partoprenas la UK en Harlemo, samideaninon Marta Ungwarszka kaj ŝian fileton Martin-Dominik el Košice, ges. Matirko el Košice.

Samideano L. Nemčok skribas:

"S taĝkým srdcom Vám oznamujem, že tohoto roku cez všetko úsilie nemohol som prísť do Doks, hoci to bol môj celoročný cieľ. Velmi tužim za samideánskou partiou, ktorá bola v mojom živote dosiaľ najlepšia. Ho, nepomáhá mi teraz nič, len čakať a tešiť sa nádejou, že na rok sa kurz bude opakovať. Slabá potecha, ale predsa niečo. Prajem všetkým účastníkom príjemné prežitie krásnych dní v Doksoch ..."

Simile skribas sam. Inĝ. Ondřej Gottesman el Lovosice, kiu promesas veni almenaŭ por unu tago.

KLAĈANGULO

Ankoraŭ hieraŭ du samideaninoj dum tagmezo ne povis trovi sian loĝejon, kvankam unu el ili partoprenas la Kolegion jam naŭan fojon.

Hra na "slepou bábu" na pláži neměla by se stát záležitostí s. Chytila, který sice dobře "chytá", ale ještě lépe objímá. Myslíme, že s. Š. se hra líbila!

ZPRÁVY REDAKCE

V pátek vyjde čtvrté a poslední číslo letošního Verda Voĉo. Je na nás všech, aby bylo co nejpestřejší, proto očekáváme mnoho hodnotných příspěvků. Uzávěrka pro příspěvky je ve čtvrtek v 11 hodin. Příspěvky pozdější nebude lze uveřejnit, proto je odevzdejte včas s. redaktorovi!

Verda Voĉo de Doksy

INFORMATIVNÍ, POUČNÝ A ZÁBAVNÝ OBĚŽNÍK LETNÍ KOLEJE ESPERANTA V DOKSECH
INFORMA INSTRUA KAJ AMUZA BULTENO DE SOMERA ESPERANTO-KOLEGIO

Kvara numero en Doksy

6.8.1954.

Aperas laŭbezone.

PEVNÁ VŮLE ZARUČUJE ÚSPĚCH!

Již 14 dní uplynulo od zahájení naší koleje. Čtrnáct dní je krátká doba, ale přece důležitá. Řekněme, že bychom se každý den naučili jenom pěti slovíčkům, t.j. 70 slovům. Násobme tato slova předponami a příponami, které v esperantu máme a dostaneme skutečně vysoké číslo. Kolik slov by to bylo za rok, kdybychom se naučili jen jednomu slovíčku za den? Vidíte, a není to žádný nesnadný úkol, jenom pevná vůle je zapotřebí. Každý z vás si musí najít nejvhodnější dobu (ve vztahu ke své osobě) k učení a v tomto učení vytrvat. Každý úspěch musí být zaplacen určitou námahou. Uvědomte si tento zákon o rovnováze a učení bude vám lehčí. Slova „Nemám čas!“ škrtněte ze svého slovníku. To je jenom omlouvání slabé vůle. Dokažte, že vy jste pánem času a čas vám bude sloužit.

Končíme naši letošní kolej, neloučíme se však s vámi, neboť věříme, že se spolu setkáme ve společné práci. Naše práce jest krásná, protože směřuje k vybudování naší vlasti a míru na celém světě.

Ĉis la revido!

Ant. Slanina

RECEDU

Ŝi estas for. Nun ĉiu horo,
ĉiu malfrua rememoro
estas sufer' sen ĉia lim'.
Nun provas mia laca koro
ankoraŭ krii, kun angoro,
tri vortojn: „Mi adoras vin!“
Sed ŝi ne aŭdas! Sen valoro
mi vokas, stulta trolaboro!

Ne min sopiras Georgin'!
Ŝin la alia kun fervoro
kisas. Kaj kiel pasifloro
al li ŝi mole donas sin.
Kaj mi do cedu for sen gloro
kaj, se mi povas, sen doloro
min turnu, eble, al Alvin'...

Karolo Piĉ

Noto de la redakcio ;

Ĉi tiu kaj ankaŭ la jam publikigitaj 2 poemoj estis prenitaj el la dua parto (Ekkrijoj al Georgino) de la "KOMPLETA VERKARO" (I.—III — 222 poemoj) de Karolo P í ĉ , Litomislio, februaro 1951.

KRONIKO

La 2an de aŭgusto bela vetero ellogis posttagmeze al la strando. Menciinde estas, ke eĉ tie oni pigras kaj en freŝa aero kaj sunbrilo en kadro de la oratora kurso okazas prelegetoj kun sekvanta diskuto. Ciklon da prelegetoj ĉ. 40 minutaj pri temoj filozofiaj komencis s-ano Kořínek kaj disvolviĝis neatendite longa kaj vigla diskuto, kiu daŭris dum 1 ½ horoj. Vespere en la Kultura Domo prelegis direktoro de SKED s-ano Dro A. Pitlík pri siaj interesaj spertoj kaj precipe gajaj travivaĵoj dum siaj mondvojaĝoj per Esperanto. Per absorba kaj humura maniero li rakontis pri epizodoj el Skandinavio, Nederlando, Germanujo, Anglujo, Francujo, Hispanujo, Italujo, Rusujo. El lia pli ol unuhora prelego evidentiĝis, ke en la frua periodo de Esperanto, la traeŭropa vojaĝo de Dro Pitlík kune kun la mondvojaĝoj de Parish kaj Dro Edmond Privat havis eksterordinaran propagandan valoron kaj ege utilis al nia afero. La belan paroladon de nia 71 jara pioniro, kiu jam 52 jarojn fidele fosas nian sulkon rekompencis apreze ĉiuj per longa aplaŭdo. Marde matene, sidante ĉe la matenmanĝo en nia kolegia „laktejo“, kiun apud sia esperantaĵa stando instalas la senlaca s-ano Pytloun fervore zorganta pri niaj stomakoj, ni konstatis, ke fariĝas belega tago, kiun ni ankoraŭ ĉi-jare ĉi tie ne ĝuis. Kaj vere la vetero estis dum la tuta tago simple fabela. Posttagmeze daŭriĝis la prelega ciklo de s-ano Kořínek sur la strando. Sekvis diskuto pri temoj filozofiaj, kiun partoprenis pluraj samideanoj, kiuj montris sian elokventon en debato pri temoj malfacilaj kaj pretendaj. La ciklo daŭros ankaŭ dum la pluaj posttagmezoj. Vespere okazis lampiona vespero sur la lago, kiu fariĝis ree grandioza spektaklo. En varma somera vespero alfluadis la loka loĝantaro al bordoj de la lago. Tie jam okupis la anoj de la

kolegio ĉiujn boatojn ornamitajn per buntaj lampionoj kaj flagrantaj torĉoj. Antaŭ la komenco de nia Venecia nokto faris per la stranda disaŭdigilo paroladon reprezentanto de Pacdefenda movado k-do Tvrdek, kiu emfazis signifon de venko de Paca ideo en la Ĝeneva konferenco. Lia parolado estis plurfoje aplaŭdita. Post la 21a horo komencis la belega artfajraĵo. Sur la malhela aŭgusta firmamento krake kaj sible disĵetiĝis steloj ruĝaj, bluaj, verdaj kaj arĝentaj kaj sinkadis sur la malheliĝintan akvonivelon. Arĝenta kaj ora fontanoj kaskadis sur la bordo kaj surdigaj knaloj tondradis reeĥataj de la ĉirkaŭaj montoj kaj arbaroj. La bunte iluminitaj boatoj rempromenis sur la akva vasto, kunĉeniĝante formis serpentantajn vicojn, el kiuj aŭdiĝis gajaj kantoj kaj alvokoj, inter kiuj elstaris la bela, forta voĉo de s-ano Eischhof. Du motorŝipoj riĉe ornamitaj per lampionoj kun muzikregalantaj kapeloj rondveturadis tra la mistere bela nokto. Vespere rave bela,fortimpresa kaj neforgesebla pasadis ĉirkaŭ ni. Dume sur la stranda estrado ludis por danco alia orkestro. Tie fine kolektiĝis la gesamideanoj kaj ankaŭ la cetera publiko kaj oni ĝuis en freŝa vespera arbara aero ĉe bona muziko kaj en agrabla medio la reston de la vespero. Kontentaj revenadis noktomeze la kolegianoj tra varma somernokto hejmen kaj kelkiu juna koroparo, riĉiĝinta je nova forta travivaĵo sentis pli rapidan korbato.

Merkrede la 4an de aŭgusto daŭris la belega vetero, kiu lasis la kursanojn ĝui la banadon kaj sunumadon, kvazaŭ ĝi volus kompensi la nubajn tagojn pasintsemajnaj, kaj post la antaŭtagmeza serioza laboro en la lernejo duoble bongustis la posttagmezoj en la ora sablo de la plaĝo. „Vespere de Karel Čapek” fariĝis denove evento. Sur la scenejo de hotelo "Jelen" prezentis al ni s-anino Eva Suchardová kun siaj kunlaborantoj scenojn el dramverkoj de nia glorfama verkisto. Per enkondukaj vortoj s-ano Seemann prezentis al ni Karlon Čapek, kiel verkiston de vera, malkaŝita homeco, de homeco en sia grandiozo kaj naneco. En lingvaĵo kristale klara kaj popole natura kaj tamen plej altgrade artisma parolas al ni Čapek pri la fragila, pekema kaj tamen altcelema kaj belon kaj bonon serĉanta homeco.

Li, de socialistoj stampata kiel burĝo, de burĝaro konsiderata socialisto, estis envere nur granda, pura homo serĉanta la veron kaj kun amanta koro pledanta por la maljustumitaj. En apokrifoj „Dekadenc tempo” la deklamarto de Eva Suchardová transmetis nin en la ŝtonan epokon, kie la familiestrino parolas gajsprite pri lingvo de niaj tagoj, pri la problemoj de kaverna homo. Jes, eĉ tiam oni estis ŝokata de la novaĵoj kaj „malpia progresemo” de la junaj. Sekvis drameca monologo de Gonerila, filino de reĝo Lear. La dramatikaj muntaĵoj el „Afero Makropulos” kaj „Patrino” donis al ni fortan tutece impresantan artisman bildon. En ili ree ekbrilis la senkompara granda arto de Eva Suchardová. Ĉu estos ebligite al la tutmonda esperantistaro admiri ĉi tiun fenomenulinon? Aktore bonan roldonon prezentis ankaŭ s-anoj Ant. Seemann kaj F.J. Kubišta. La interscenajn pianajn enmetaĵojn prezentis eĉ sur kaduka instrumento belrezulte nia talentita juna pianistino Věra Škutová. Adekvate bona estis la kunlaboro de s-anino L. Rejthárková kaj de s-ano Kubišta. La pluaj preparitaj muntaĵoj ne povis jam esti prezentitaj pro la progresinta tempo. Sed ĉiuj disirante konsciis: nia granda majstro trovis samgradajn interpretantojn, kaj eĉ la plej granda ĉeĥa scenejo ne povus prezenti ion pli perfektan.

Ĵaŭde la 5an de aŭgusto trovis la kronikisto okazon ree, jam pluran fojon, observi la funkciadon de la oratora kurso E. La gvidanto de ĉi kurso s-ano A.Slanina kun s-ano V.Špŭr inicis hodiaŭ la aŭskultantojn, konsistantajn el C- kaj D-kursanoj en arton „kiel trakti homojn”. Necesas rekoni, ke la oratora kurso de s-ano Slanina ĉiutage gvidata, donas surprize bonajn rezultojn, instruas kaj kuraĝigas la samideanojn publike paroladi, diskuti kaj racie kaj konvinke sin esprimi. La posttagmezaj diskutoj kaj prelegoj sur la strando pruvis tiun sperton. Vespere en la salono de Zátíší okazis la Artvespero kun solena premidisdono de literatura konkurso „Floraj Ludoj de Doksy 1954”. La programo komenciĝis per ĥorkanto de LA ESPERO, kiun prezentis la gea ĥoro de kolegianoj sub faka direktado de Dro Josef Fousek. Sekvis ĥorkanto de Tagiĝo kaj nia simpatia talenta pianistino Věra Škutová majstre ludis la Polkon de Luiza de Smetana. S-ano F.J. Kubišta deklamis propran poemon „Mi estas por paco” kaj kantis la kantojn Tálinský rybník kaj Negran lulkanton. Eva Suchardová en sia superba deklamo prezentis poemon Fajra Ondo de Mir. Rutte en traduko de R.Hromada. S-anino Škutová ludis Asmajoran valson de Chopin kaj s-ano Kubišta recitis poemojn „Kie mi ektroviĝas” de Neruda kaj „Grilo” de Kainar. S-anino Chmelíková kantis popolan kanton „Larĝa, profunda” en perfekta traduko de Dro Fousek. Post la paŭzo pianludis s-ano Kubišta „En rondo” de Dvořák kaj „Revadon” de Schumann. S-anino Suchardová recitis poemojn „Ombroj” de Šrámek en traduko de T.Pumpr kaj la ĉi-jare en UEA konkurso premiitan poemon de Eli Urbanová „Antaŭ spegulo”. S-anino V.Škutová virtuoze pianludis Valson E-minoran de Chopin, s-ano prof. Fischhof kantis per sia belsona voĉo kantojn Sari Marejs kaj du slovakajn popolajn kantojn. La kolegia ĥoro sub ĥorestro Dro Fousek kantis la kantojn Juna Amo, Dormu dolĉe, Sub fenestro nia. Akompanis sur piano s-ano inĝ.Libra kaj sur violono s-ano Vítek. En la varia programo ĉuj aktivintoj inde kontribuis al la bela vespero. Precipe elstaris la perfekta, profesie

rutina kaj tamen trasentita artodono de s-anino Suchardová kaj sentoplena, artisme vere altnivela pianludo de nia juna promesa pianistino Věra Škutová.

En la paŭzo de la programo okazis la solena premiado de la konkurso „Floraj Ludoj“ de Doksy 1954. Direktoro de SKED Dro Aug.Pitlík koncize eksplikis la devenon kaj signifon de „Floraj Ludoj“ kaj transdonis al ĉiu premiito florbukedon, premidokumenton kaj monpremion. Premiitaj estis Karolo Píř por poemo „En rozĝardeno“, Eva Suchardová por poemo „En pluva tago“, Jiří Kořínek por poemo „Rifuĝo“, Jan Kafka por traduko de poemo de Jarosl. Seifert „Sovaĝa rozo“ el poemaro „Iris malriĉa pentristo en la mondon“ kaj Ludmila Rejthárková por la poemo „Kritiko pri Karlini“. Ĉiu el la premiitaj alsendis plurajn laborojn, el kiuj estis premiitaj la suprecititaj verkoj.

Dum la disdono de la premioj invitis s-ano Dro Pitlík ĉiun el la gepoetoj tralegi sian premiitan verkon. La dankema aŭskultantaro rekompencis la verkojn per forta aplaŭdo. La solenaj momentoj pruvis, kian gravan kaj kuraĝigan rolon SKED havas ankaŭ sur kampo de Esperanta literaturo kaj poezio. Vendrede la 6an la tradicia somera karnavalo en salonego de Zátíř finis la riĉan amuzan kaj kulturan programon de la Kolegio. Regis la kutima sincera gajo kaj amika etoso. Svarmis la belaj maskoj, giris la junaj korpoj apud la rejuniĝintaj. La belajn horojn de lasta kunestado nur iom tristigis la ekpenso, ke morgaŭ kaj postmorgaŭ ni devos disiri al plej malsamaj partoj de la respubliko. Sed en ĉies koro jam ĝermis firma decido, se Dio helpos: Ĝis la revido en Doksy 1955!

J. K.

LA FINO

Ĉi numero de la „Verda voĉo“ estas la lasta aperanta ĉi-jare en Doksy. Tio signifas, ke alproksimiĝas la tago, kiam finiĝos la Somera kolegio 1954. Estas malgaja penso por ni ĉiuj, kiuj partoprenis la kolecion kaj ĝuis la multajn bonplenajn instruhorojn, kiel ankaŭ la ĝojigajn diversajn prezentadojn kaj prelegojn, ke jam venos la fino de nia ĝoja kunestado. Sed ni tamen ne povas esti malĝojaj pri tio, ĉar en la universo ne ekzistas fino. Ĉiu fino signifas novan komencon, kaj ĉiu nova komenco promesas ĉiam ankoraŭ pli grandan ĝojon. Certe ĉiuj partoprenintoj, aĝaj (nur laŭ jaroj), plenkreskuloj, gejunuloj, ja eĉ infanoj ne forgesos la belajn horojn, kiujn ni en amo, paco kaj interkompreno kune travivis. Ni refreŝiĝis anime kaj korpe, kaj fortigitaj per la instruado ankaŭ por nia glora movado, ni reiros hejmen por pli bone daŭrigi nian laboron, la disvastigadon de la lingvo de amo - de Esperanto por la beno de ĉiuj homoj bonvolaj. Tutkoran dankon meritas nia lektora kolegaro, kiu senlace ĉiutage oferis al ni siajn tempon kaj forton. Sed ne malpli koran dankon meritas ankaŭ nia kara s. Pytloun, kiu ĉiam ege zorgis pri nia korpa bonfarto.

Do, ni ne ploru pri la fino, sed ĝoju pri la nova komemo de la somera kolegio en Doksy 1955. Ĝis la revido!

Alojz Kremer

S-ano Imrich Sedlák, Ĉejkov apud Trebišov skribas:

Mi salutas vin ĉiujn, kiuj estis tiel feliĉaj, ke vi povis partopreni la someran kolecion de Esperanto ĉe la bela Mácha-lago. Ankaŭ mi planis tiel...

Ni ĉiuj planu kaj penu fari nian vivon pli bela, pli paca, pli progresema en justeco kaj ama interkompreno. Niaj planoj ekstere - je videblaj sukcesoj - ne multe progresis, sed la mondo sen harmonio, sen interkompreno kaj fido en hom-atomoj disfalinta, bezonas nin kaj nian lingvon. Ni esperu kaj vivante home diskonigu en nia ĉirkaŭaĵo niajn ideojn!

Gesamideanoj! Ni esperantistoj ekkonis en nia lingvo altan ideon kaj valoran kulturfaktoron kaj ni vidas klare antaŭ ni la difinitan celon. Pro tio venis ree en nian amatan urbon Doksy tiom da fervoraj gesamideanoj, kiujn ne plu timigis la noktaj fantomoj. En lasta tempo ni povis bone konstati, kiel Esperanto konkeras terenon paŝon post paŝo. Eĉ ĉe la pasintjara Universala Kongreso estis oficiala observanto de UNESKO. El tiu fakto ni vidas klare, ke niaj fervoraj laborantoj laboras laŭ la devizo: La espero, la obstino kaj la pacienco. Per ilia flamanta torĉo ni ekbruligis ankaŭ niajn modestajn kandelojn en Doksy.

F. Pytloun

Zprávy redakce.

Prosíme o prominutí, že z technických důvodů nemůžeme otisknouti celou řadu došlých příspěvků, i když jejich hodnota si toho plně zaslouhuje. Spolu se sazečem a pomocným kolektivem se s vámi loučíme, milí čtenáři, účastníci SKED a přejeme vám mnoho úspěchů na pracovním poli i při esp. práci. Rozjíždíme se do všech koutů naší vlasti a zbývá nám jenom provolati společně naše upřímné „Ĝis la revido en Doksy 1955!“